

Miraĝo

--- Apud la Maro II ---

originalo: AKUTAGAWA Ryuunosuke

1

En iu tagmezo de aŭtuno mi iris spekti miraĝon kun la studento Koĉjo, kiu venis el Tokio por pasigi tempon ĉi tie. Ĉiuj eble sciis, ke la miraĝo videblas sur la marbordo de Kugenuma. Ankaŭ la servistino en nia hejmo spektis miraĝon spegulantan renversite ŝipon, kaj admire diris:

“Ĝi estis tute sama kiel la foto en la ĵurnalo.”

Ni turnis nin ĉe laŭbo. Ni decidis, ke ni invitu survoje ankaŭ Oĉjon. Li portis ruĝan ĉemizon kiel kutime. Ni povis vidi trans la heĝon, ke li pumpas akvon el puto ŝvitante. Mi levis bastonon el frakseno, kaj signis al li.

“Eniru en la domon de tie. Ja, ankaŭ vi venis!”

Eble Oĉjo pensis, ke ankaŭ Koĉjo venis viziti lin.

“Ni iros spekti la miraĝon. Ankaŭ vi ne iru kun ni?”

“Miraĝon?”

Li ekridis abrupte.

“Lastatempe furoras miraĝo.”

Post kvin minutoj ni jam paŝis sur vojo kun profunda sablo. Maldekstre etendis sin vasta plaĝo. Ni povis vidi oblikvajn kaj nigrajn du striojn da postsigno de bovĉaro. Mi sentis ion korpemigan vidinte la postsignon: postsigno de laboraĵo de vigla geniulo. Ion tian mi ne devis ne senti.

“Ankoraŭ mi ne estas sana, ĉar eĉ vidinte tian spuron mi sentas min malforta.”

Oĉjo nur kuntiris la brovojn, kaj ne respondis rekte al mia parolo, sed ŝajnis, ke li plene komprenis mian korinklinon.

Dume ni paŝis laŭ la bordo de la rivero Hikizi inter pinarboj --- maldensaj, malaltaj pinarboj. Ni povis rigardi klaran kaj indigobluan maron trans la larĝan strandon. Tamen ĉiuj domoj kaj arboj en Enosima estis melankolie nubaj.

“Nova epoko!”

Eldiro de Koĉjo estis abrupta, kaj plie ĝi entenis rideton. Nova epoko? Ja, mi tuj trovis la “novan epokon”: gevioj rigardantaj maron antaŭ kontraŭsabla bambuheĝo. Sed la viro portanta maldikan pelerinon kaj feltĉapelon ne valoris esti nomata “nova epoko”. Kontraŭe, la virino estis certe plenvalora pri la “nomo” ne nur koncerne al mallonge tonditaj haroj, sed ankaŭ koncerne al sunombrelo kaj ŝuoj kun malaltaj kalkanumoj.

“Ili ŝajnas feliĉaj, ĉu ne?”

“Por vi ili estas enviindaj, ĉu?”

Oĉjo eĉ ŝercis pri Koĉjo.

La observejo de la miraĝo estis 100 metrojn for de la loko. Ili kuŝis ĉiuj surventre, kaj rigardis la strandon flagrantan transe de la rivero. Ni povis vidi flagran, bluan strion larĝan kiel rubando. Al ni ŝajnis, ke la flagreto reflektas nur la koloron de la maro, sed ne videblis alia figuro kiel ŝipo sur la

strando.

“Ĉu oni nomas ĝin miraĝo?”

Koĉjo diris malesperige kun la mentono plena de koto. Tiam venis korvo de ie, flugis super la strando du- aŭ tri-cent metrojn fora, kaj malleviĝis trans la flagreton indigobluan. Samtempe dum momento reflektiĝis renverse la figuro de la korvo super la zono de la flagreto.

“Hodiaŭ ni kontentiĝu per ĉi tio, ĉu ne?”

Ni ekstaris de sur la sabla tero kun la eldiro de Koĉjo. Tiam de antaŭe paŝis al ni la duopo “nova epoko” , kiu devas esti post ni.

Mi konsternite returnis min. Sed mi trovis, ke la duopo paroladis ŝajne kiel antaŭe antaŭ la heĝo distanca je 100 metroj de ni. Ni, precipe Oĉjo, perdis streĉon kaj ekridis.

“Prefere ĉi tio estas miraĝo, ĉu ne?”

La duopo antaŭ ni estis tute aliaj homoj ol la malantaŭaj. Sed mallongaj haroj de la virino kaj feltĉapelo de la viro estis preskaŭ samaj kiel tiuj de la malantaŭaj.

“Mi sentis teruron.”

“Ankaŭ mi demandis min, kiel ili povis aperi antaŭ ni.”

Tiel parolante ni iris returne trans la malaltan dunon, ĉifoje ne laŭ la bordo de la rivero Hikizi. La duno ŝanĝis flava la malaltan pinon ĉe la bazo de kontraŭsabra heĝo. Kiam Oĉjo pasis preter la heĝo, li klinis sin langvore, kaj prenis ion de sur la sablo. Ĝi estis ligna plato kun eŭropaj literoj ĉirkaŭitaj de nigra krado eble brodita de bitumo.

“Kio ĝi estas? *Sr. H. Tsuji.....Unua.....Aprilo.....Jaro.....1906.....**”

“Kio estas? *dua.....Majesta.....*? Ankaŭ skribite, 1926 **”

“Ĝin oni uzis por akvosepulto de kadavro, ĉu ne?”

Oĉjo konjektis tiel.

“Tamen, kiam oni sepultas kadavron en akvon, oni kovras la kadavron nur per tolo, ĉu ne?”

“Pro tio oni ligis la platon al la tolo. Tie vi vidas najlon. Origine ĝi estis kruco.”

Ni paŝis apud la bambua heĝo de vilao kaj tra la pinarbararo. Eble la plato estis tia, kiel Oĉjo konjektis. Ankaŭ tiam mi sentis ian teruron ordinare ne senteban en sunlumo.

“Eble ni trovis malbonaŭguraĵon !”

“Mi konservos ĝin kiel talismanon; en la jaro 1906 kaj 1926, do tiu homo mortis en la aĝo de 20, jes, en la aĝo de 20.”

“Ĉu la homo estis viro aŭ virino ?”

“Mi ne scias, sed eble la homo estis sangmiksulo.”

Respondante al lia demando mi imagis sangmiksitan junulon mortintan en ŝipo. Laŭ mi lia patrino devis esti japanino.

“Miraĝo...”

Tiel Oĉjo murmuris abrupte, vidante rekte antaŭen. Povas esti, ke li senintence diris tiel, sed mi feble sentis ion en mia koro.

“Ĉu ni trinku nigran teon?”

Dume ni estis ĉe la angulo de ĉefa strato domplena...domplena? Sed sur la strato kun seka sablo troviĝis preskaŭ neniu pasanto.

“Kion vi faros de nun?”

“Ion ajn...”

Tiam venis al ni blanka hundo kun vosto pendinta.

2

Post kiam Koĉjo reiris al Tokio, mi, Oĉjo kaj mia edzino kune paŝis trans la ponton de la rivero Hikizi. La tempo estis ĉirkaŭ la sepa horo pm; ĝuste post la vespermanĝo.

En tiu tago ni ne povis vidi eĉ stelojn. Ni paŝadis preskaŭ silente sur la senhoma strando. En la strando ĉe la rivera buŝo de Hikizi videblis flagranta fajrero. Ĝi devis esti marko por fiŝŝipoj en marmezo.

Kompreneble bruo de ondoj aŭdiĝis seninterrompe, kaj odoro de la marbordo fortiĝis iom post iom. Ŝajnis, ke la odoro devenis ne de la marbordo mem, sed pli multe, de marherboj kaj ondolvitaj ŝtupoj. Ial mi sentis la odoron krom per la nazo, ankaŭ per la haŭto.

Ni staris ĉe la plaĝo dum momentoj, kaj rigardis la briletadon de la ondokrestoj. La maro estis ĉie malluma. Mi rememoris la tempon, kiam mi loĝis apud iu marbordo de Kazusa. Samtempe mi rememoris ankaŭ la amikon kune restintan tie. Li ne nur strebis al sia studo, sed reviziis mian manuskripton de la noveleto, “Ignamkaĉo”.

Dume Oĉjo fajrigis alumeton, kaŭrante ĉe la plaĝo.

“Kion vi faras?”

“Ne specialan aferon... Ni povas vidi diversajn objektojn, se ni fajrigas eĉ iomete.”

Li levis la okulojn, rigardis nin trans sia ŝultro, kaj parolis duone al mia edzino. Vere la fajrero de unu alumeto prilumis diversajn konkojn inter dise ĵetitaj marherboj kiel verdaj algoj kaj agaroj. Kiam la fajrero estingiĝis, Oĉjo fajrigis alian alumeton, kaj malrapide paŝis sur la strando.

“Ja, timige... Mi pensis, ke ĉi tiu estas piedo de droninto.”

Tie estis unu naĝsuo duone sin kaŝinta en sablon. Tie ankaŭ troviĝis grandaj spongoj inter marherboj. Sed kiam la fajreto estingiĝis, ĉirkaŭe regis pli da mallumo.

“Nun ni ne trovis pli da akiraĵo ol en la tago.”

“Akiraĵo? Temas pri la plato? Tian raran ni malofte trovas.”

Ni decidis reiri aŭdante la ondasonon malantaŭ ni. Ni piedpremis ne nur sablon sed ankaŭ marherbojn.

“Ankaŭ ĉi tie troviĝas diversaj aĵoj.”

“Ĉu mi frotu alumeton refoje?”

“Jam sufiĉe...Aŭdiĝas sono de tintilo.”

Mi iom streĉis la orelojn. Ĉar lastatempe mi ofte halucine aŭdas. Tamen, ŝajnis ke, vere, de ie aŭdiĝas sono de tintilo. Mi volis demandi Oĉjon, ĉu ankaŭ nun aŭdiĝas la sono. Tiam la edzino, kiu du aŭ tri paŝojn poste sekvis nin, alparolis nin ridante.

“Miaj lignoŝuoj tintas, vi aŭdas?”

Ne. Ŝi portas sandalojn, mi scias.

“Ĉivespere mi portas lignoŝuojn kiel knabino”

“Mi aŭdas la tintadon el la maniko de vi, sinjorino. Certe ludilo de Jonjo! Ludilo kun tintilo el celuloideo.”

Oĉjo ekridis dirinte tiel. Dume la edzino atingis nin, kaj ni trio pe paŝis. Ni parolis pli gaje ol antaŭe pro ŝia ŝerco.

Mi parolis al Oĉjo pri la hieraŭa sonĝo: en la sonĝo mi parolis kun ŝoforo de kamiono antaŭ moderna domo. Mi estis certa, kvankam en sonĝo, ke mi iam renkontis tiun, sed mi ne povis diveni kie mi renkontis lin eĉ kiam mi vekigis.

“Kaj subite mi eksciis, ke la homo estas la redaktistino, kiu venis al mi antaŭ kelkaj jaroj nur unu fojon por skribi laŭ mia diktado.

“Do, la ŝoforo estis virino?”

“Ne, la ŝoforo mem estis viro, sed en la sonĝo la vizaĝo estis la ŝia. Certe, unu fojon vidita vizaĝo restas en memoro, ĉu ne?”

“Certe jes, se temas pri impresa vizaĝo...”

“Sed mi ne havis specialan intereson al la vizaĝo. Pro tio mi havas maltrankvilon. Mi sentas, ke diversaj aferoj ekzistas ekster la konscio.”

“Tio signifas, ke ni povas vidi diversajn aĵojn, kiam ni fajrigas alumeton, ĉu?”

Tiel parolante, mi hazarde trovis, ke mi povas klare vidi nur iliajn vizaĝojn. Sed eĉ stelumon ni ne povis vidi kiel antaŭe. Mi sentis ion maltrankviligan kaj rigardis kelkfoje supren. La edzino rimarkis mian agon, kaj respondis al mi divenante mian demandon.

“Eble pro la sablo! Ĉu ne?”

Ŝi turnis sin al la granda strando svingante la manikojn.

“Povas esti...”

“Sablo estas petolema. Ankaŭ miraĝon ĝi faras...Sinjorino, vi iam spektis miraĝon?”

“Nur unu fojon! Nur ion simple bluan.”

“Jes, tute same...Ankaŭ ni spektis tian.”

Ni transpaŝis la ponton super la rivero Hikizi, kaj paŝis ekster la digo antaŭ la laŭbo. Ĉiuj arbopintoj de pinoj siblis forte pro nerimakite aperinta vento. Ŝajnis, ke malalta viro rapide venas al ni. Ial mi rememoris la iluzion spertitan en la somero: en iu vespero kiel hodiaŭ mi prenis paperaĉon sur branĉo por kasko. Sed la viro ne estis iluzio. Plie, kiam li alproksimiĝis, ni povis vidi la brustan parton de la ĉemizo.

“Kia kravatpinglo! Ĉu vi vidis?”

Post kiam mi diris tiel, mi tuj trovis, ke tiu estas fajro de cigaro, sed ne kravatpinglo. La edzino subridis kun maniko sur la buŝo antaŭ ol aliaj. Sed la viro preterpasis nin sen rigardi flanken.

“Bonan nokton!”

“Bonan nokton!”

Ni geedzoj adiaŭis Oĉjon kun malmultaj vortoj, kaj paŝis en la sonoj de vento ĉe la pinoj. Inter la sonoj leĝere miksiĝas ĉirpado de insektoj.

“Kiam okazos la ora soleno de la geedziĝo de la avo?”

“La avo” signifis mian patron.

“Mi ne scias. Ĉu butero jam atingis nin?”

“Ankoraŭ ne, nur kolbaso venis.”

Dume ni jam venis al la pordo...duone malfermita.

**La originalo estis esprimita tiel en Esperanto. La aŭtoro, AKUTAGAWA Ryuunosuke sciis Esperanton eĉ iom.*